

& Publikeco:

< Rekante 21 el 43 batoj por strofo, entute 301 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Wisława Szymborska (Vokado al Jetio, 1957). Tradukis Lidia Ligęza (Mi inventas la mondon, 2015). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,5:43> (/La LaLa dore mimi mimi; mi rere mimi dodo Ti Ti, La LaLa dore mimi mimi; mi rere mido Tido La La;

(#Rekantaĵe: So SoSo dore mimi mimi; do mi redo domi Ti; So SoSo dore mimi mimi; do mi redo Tido La a)

)×7)+

(& Strofoj:

'1 /Jen ni, la geamantoj ekaj ; vestitaj nur en la palpebrojn, ; sufiĉas, ke por ni belegaj ; ni kuŝas nude en tenebro.

(×: **Arbon mi volas flari floron ; flugi en la foliar'** ; **Arbon mi volas flari floron ; flugi en la foliar'**.)

'2 Sed tamen scias pri ni forno, ; ĉi kvar anguloj malafablaj ; kaj konjektemaj seĝo-ombroj. ; Signifoplene mutas tablo.

'3 Kaj scias glasoj, ke ne gravas ; duontrinkita te-dekokto. ; Swift* la esperon jam ne havas ; esti legata dum ĉi nokto.

'4 Birdoj? Kontemplu sen ĥimero: ; ili publike nin provokas, ; hieraŭ skribis en l' aeron ; la nomon, kiu vin alvokas.

.....

'5 Kaj l' arboj? Diru, kion portos ; ilia flustro multjarcenta? Vi diras: Eble vent' raportos. ; De kie pri ni scias vento?

'6 Enfalis nokta papilio, ; faras alflugojn kaj forflugojn, ; susuras super kapoj niaj ; per flugiletoj kun lanugo.

.....

'7 Ĝi plie ol ni vidi penis ; – insekt' sagace okulumas. ; Mi ne sentis, vi ne divenis, ; ke niaj koroj nokte lumas.)